


Boletín

Federación Española de Esperanto
Asociación de Utilidad Pública



N-ro 326 • Majo-Junio 1996

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9º C
ES-50002 Zaragoza

Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Marín
Vicente Hernández Llusera
Andrés Marín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13-3º-7
Es-28015 Madrid
Tel. +faksilo: +34-(9)1-446-80-79
esperanto@canaldinamic.es

Estraro

Prezidanto: Antonio Alonso Núñez
Vicprezidanto: José M. Galofré Domingo
Sekretario: Manuel Parra Benito
Vicsekretario: Marcos Cruz Martín
Kasisto: José M. Bernabeu Franco
(konto: 14.011.966, Caja Postal)
Voĉdonantoj:
Luis Hernández García
Antonio Marco Botella
Juan Antonio Cabezos
Augusto Casquero de la Cruz

Kovrilo: D-ro Selten kaj lia edzino kun la dekano de la murcia Fakultato pri ekonomiko kaj kelkaj esperantistoj.

Nota: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Enhavo

Nobelpremio kaj Esperanto (José Luis Pérez Ovilo).....	2
Konto-estado de Libroservo en 1995	3
"Balance de situación, 1995" de HEF.....	4
"Cuenta de explotación, 1995" de HEF	5
Voko al Ĝenerala Kunveno de HEF	6
Jarraporto de la HEF-Estraro	7
Deziraro korespondi	9
Viglas la movado	10
Intervjuo duonvoĉe (Luis Serrano Pérez).....	15
Esperanto kaj Esperantismo (Giordano Moya).....	18
Lingve lama kontrakto (Bernard Golden).....	21
Kio do pri la Esperanta-semajno? (Luis Serrano Pérez).....	23
Kvazaŭ defende de la ikso-alfabeto (José F. Martín del Pozo).....	25
Intervjuo al prof. Selten (La Redakcio)	26
Esperanto sur lia vojo (Velus).....	28
Omago al Amalia Núñez Dubus	31

2 Nobelpremiito kaj Esperanto

José Luis Pérez Ovilo

Prof. Selten, Nobelpremiito pri Ekonomiko en 1994, naskiĝinta en 1930 venis en Murcion je la komenco de pasinta marto, invitita de la Universitato de tiu urbo, subvenciita de tiu institucio kaj la firmo **CajaMurcia** kaj ĉio planita de murcia esperantisto.

Kiam mi pensis inviti profesoron Selten veni en Murcion, mi troviĝis antaŭ grava malfacilo: ke la eminenta homo tute ne plaĉas akcepti invitojn de Universitatoj, eĉ se ili estas la plej prestiĝaj el la mondo, tamen mi profitis la avantaĝon ke temas pri homo kiu sin konsideras civitano de la mondo kaj uzas kiel dua lingvo Esperanton, kio koincidas kun la certa fakto, ke mi estas delegito en Murcio de UEA, do, ekzistis certa espero ke mia invito prosperos...

Mia projekto enhavis du plej gravajn celojn, unue prestiĝigi nian Universitaton kaj nian regionon, kaj tio plene sukcesis, ĉar D-ro Selten kolektis ĉirkaŭ si okaze de la seminario kiun li prezentis ĉe la Fakultato pri Ekonomiko de Murcio, la plej elstarajn fakulojn pri la temo «Ludoteorio» el la tuta Hispanio. La dua celo volis elmontri al tiuj kiuj senfundamente proklamas ke Esperanto nur estas simpla kodo kaj ne lingvo kapabla esprimi la plej delikatajn nuancojn el la sento kaj la plej malfacilajn altnivelajn teoriojn el la plej kompleksa temo; kaj tio pruvite restis kiam prof. Selten en ampleksa salono de CajaMurcia, elbordita de fakuloj kaj ĝenerala publiko, prelegis pri liaj altnivelaj teorioj sekve tradukitaj al la hispana de la HEF-prezidanto Alonso, kio reale neniel estus farebla per simpla kodo.

Nu, ne gravas la fiaj intencoj de la ĉiamaj rutinuloj por silentigi la gravan eventon kun ĉefrolo de Esperanto, mi ja ne parolas pri opinioj sed pri realaj faktoj, ĉar efektive lekcio pri altnivela temo estis eldirita en nia internacia lingvo, kaj tiu nekontestebla vero restas por ĉiam kiel sperto okazinta en Murcio. Kaj tio estas solida argumento en eventualaj debatoj pri la bezono de lingvo internacia kiam en la Eŭropa Unio la parlamentanoj kaj aliaj diversnaciaj politikuloj debatos tiun temon: en Murcio prelegis germana profesoro, la ĉeestantaro komprenas nur la hispanan, Esperanto taŭgas kiel pontolingvo kaj la ekzemplo taŭgas same se tio okazas en Murcio, en Tokio aŭ en Pekino...

Komenti pri lernejoj studoj en iu ajn lando rilate la lernadon de dua lingvo, pasas, devige, tra la nepra akcepto de planigitaj lingvoj; paroli pri instruado por la paco kiel transversa lecionaro, devigas nin ĉiujn akcepti neutralan instrumenton por

interkomunikado, kiu metu nin ĉiuj en egalrajtajn kondiĉojn; prikonsideri la temon pri la respektemo al diversaj kulturoj kaj rasoj, devigas nekontesteble akcepti kaj respekti aliajn lingvojn; paroli pri la hispana lingvo parolata en la mondo de pli ol 350 milionoj da personoj, devigas pro minimuma digno, ne submetiĝi al iu ajn alia lingvo de la imperio en tiu momento reganta, kaj akcepti silente tiun situacion estas hipokrita sinteno nepardonebla. Prof. Selten volus paroli en la hispana pro respektemo al la tero kaj al la ĉeestantaro preta aŭskulti lin, sed bedaŭrinde li ne scipovis tiun lingvon; eble li volus prelegi en la germana kiun li pli bone regas, sed la ĉeestantaro ne estus kompreninta lin; la nura solvo estis paroli per neŭtrala lingvo, kiu konsideris nin ĉiujn en egalaj kondiĉoj...

Kaj tiel okazis, kiel pragmata lekcio de idealisto kiu prezentas debaton bazitan en la realo.

KONTO-ETATO DE LIBRO-SERVO EN 1995

Enspezoj

Pesetoj.

Antaŭa saldo		22.131
Vendado de libroj	1.058.739	
Interesoj Poŝta Kaso	61	
Diversaj Abonoj	51.365	
JARENSPEZOJ	1.110.165	1.110.165
ENTUTEI		132.296

Elspezoj

Aĉetado de libroj	850.670	
Materialo por oficejo	74.503	
Poŝto (poŝtmarkoj O.I.C.)	59.771	
Librotransporto	42.161	
Bankaj elspezoj	15.458	
Diversaj Abonoj 1993/94	52.130	
Aliaj	4.534	
JARELSPEZOJ	1.099.227	1.099.227
SALDO AL NOVA KONTO		33.069
ENTUTEI		132.296

Valladolid, 31an de decembro 1995

La Libroservanto: Luis Hernández García

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

BALANCE DE SITUACION

ACTIVO

B) INMOVILIZACIONES	10.588.025
III Inmovilizaciones materiales	10.580.000
1.- Oficina de HEF	10.000.000
2.- Ordenadores	200.000
Fax	50.000
Encuadernador	30.000
3.- Mobiliario	100.000
5.- Biblioteca	208.025
D) ACTIVO CIRCULANTE	3.134.467
II Existencias	44.112
1.- Libros para vender	44.112
III Deudores	383.500
VI Tesorería	2.706.855
1.- Caja	12.972
2.- Cta. en Caja Postal (oficina, a cancelar)	70.910
3.-Cta. en Caja Postal	2.521.088
4.- Cta. en UEA	101.855
5.- Cta. en Banesto (cancelada)	—
TOTAL GENERAL	13.722.492

PASIVO

A) FONDOS PROPIOS	13.643.942
I Fondo Social HEF	13.623.803
VI Pérdidas y GANANCIAS	20.139
E) ACREEDORES A CORTO PLAZO	78.550
IV Acreedores comerciales	57.950
2.- Deudas por compras	57.950
VII Ajustes por periodificación	20.600
TOTAL GENERAL	13.722.492

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

CUENTA DE EXPLOTACIÓN

DEBE

5

A) GASTOS	822.111
2.- Aprovisionamiento	281.505
Compras	291.250
Variación Exit.libros	-9.745
3.- Gastos de Personal.....	50.338
Gastos Sr. Presidente	50.338
6.- Otros Gastos de Explotación.....	474.687
Mantenimiento	1.790
Comunidad	72.420
Cuota UEA	36.720
Seguro de oficina	6.407
Edición BOLETÍN	263.380
Luz	19.288
Teléfono	55.932
Varios	18.750

I BENEFICIOS DE EXPLOTACIÓN

7.- Gastos Financieros	1.125
------------------------------	-------

III BENEFICIOS DE LAS ACTIVIDADES ORDINARIAS.. 408

11.- Pérdidas procedente inmovilizado.....	25
--	----

IV RESULTADOS EXTRAORDINARIOS POSITIVOS..... 61.845

V BENEFICIOS ANTES IMPUESTOS 34.978

15.- Impuesto de sociedades.....	14.431
Impuesto I.B.I.	14.048
Ret 25% en bancos.....	383

VI RESULTADOS DEL EJERCICIO (Beneficio) 20.547



B) INGRESOS.....	842.250
1.- Ingreso neto de cifra de negocios.....	774.624
Venta de Libros	39.300
Ingreso de cuotas	722.909
Ingresos varios	12.415
4.- Otros Ingresos (donativos).....	4.223
Ingresos participaciones en capital	1.533
12.- Ingresos extraordinarios.....	61.870

VOKO AL ĜENERALA KUNVENO DE H E F

Konforme al nia Statuto, la HEF-prezidanto alvokas ĉiujn membrojn al la Ordinara Ĝenerala Kunveno okazonta en Murcia la 16an de julio de 1996, kadre de la 55a Hispana Kongreso.

TAGORDO

- 1.— Prezento, lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno.
- 2.— Prezento, studo kaj eventuala aprobo de la kontoj de HEF kaj de Libro-servo. Eventuala renovigo de kotizoj.
- 3.— Raporto pri aktivajoj dum 1995 fare de la HEF-prezidanto.
- 4.— Aljuĝo de la premio "Klara Silbernik".
- 5.— Elekto de du HEF-membroj por kontroli la Konto-Etatoj.
- 6.— Demandoj, petoj, proponoj.

Nun, pli da vojoj al HEF

HEF

91-664-80-79

esperanto@canaldinamic.es



Eldonaĵoj

Evidente, la ĉefa agado de la Federacio dum la pasinta jaro denove estis la regula publikigo de Boletín, ĉiam pli modern-aspekta kaj daŭre je mirinde malalta kosto, sub la ĉefredaktorado de Antonio Marco Botella kaj la kompostado de Miguel G. Adúriz.

Freŝa novaĵo estas la hispanlingva informilo. Tio estis dum multaj jaroj objekto de debatoj kaj rezolucioj en la estrarkunsidoj; tamen, pro diversaj kialoj la afero ree faladis en hezito kaj sindeteno. Fine, la samideano Juan Antonio Cabezas rezolute prenis la taskon sur sin kaj aperigis jam la unuan numeron.

HEF helpis la eldonon de "Lirikaj perloj de Al-Andalus", lasta verko de A. Marco Botella, aĉetante cent ekzemplerojn por disvendi ilin tra la libro-servo.

Libro-servo

Daŭre nia Libro-servo, zorgata de Luis Hernández García, provizas la hispanan movadon ne nur per libroj, sed ankaŭ per sonbendoj, kompaktdiskoj kaj lastatempe eĉ vidbendoj. Ĝi periode aktualigas kaj dissendas la koncernan katalogon.

HEF-oficejo

En la oficejo de la Federacio en Madrid plu laboris ĉefe Marcos Cruz, Maritza Gutiérrez kaj Manolo Parra. La deĵorado okazis regule marde kaj jaŭde vespere po 5 horoj.

Post dujara paŭzo, denove ĉijare (de januaro ĝis aprilo) okazis ĉeesta kurso en la oficejo. Ĝin instruis nia kunlaboranto Fernando Moral, kiu intencas komenci novan en oktobro.

Ankaŭ ĉijare diversaj amaskomunikiloj (re)kontaktis la HEF-oficejon: Telemadrid elsendis unuminutan senpagan reklamon pri esperanto, rolatan de Marcos kaj tri eksterlandaj esperantistoj. Onda Cero, radioelsendejo tutnacia, intervjuis nin dum duonhoro. Radio Voz, kiu elsendas loke aŭ regione, intervjuis Marcos dum kvaronhoro. El País aperigis noticeton pri la kompakta

disko Vinilkosmo. Ĉio ĉi rezultigis ne grandan alfluon sed ja daŭran gutadon de homoj kiuj petas kaj ricevas informojn pri esp-o.

Librotenado

Same kiel pasintjare, Pedro Garrote kaj Maritza Gutiérrez prilaboris la oficialan finanĉan librotenadon de la jaro 1995a. La rezulto estas vasta kaj teknikeca dokumento, disdonita al ĉiuj estraranoj kaj konsultebla de iu ajn membro per simpla peto al la HEF-oficejo.

La HEFanoj kiuj pagas sian kotizon per banka ordono, poblable miris ĉar HEF enspezis iliajn 1995-kotizojn ne dum 1995 sed en 1996. La granda malfruo ŝuldiĝas al pluraj katenitaj problemoj: unue la manko de kompletaj kaj ĝustaj datenoj, poste la postulo de Caja Postal, ke la listo estu aranĝita per iu speciala komputila programo...

Novaj servoj al la HEFanaro

Kolektivaj membroj

La kolektivaj membroj ricevas regule de antaŭ monatoj diversajn informojn, por helpi ties laboron, ekzemple informilojn, aniĝilojn, leterojn.

Junularo

Ekde somero'95 la junuloj de HEF ricevas regule interesajn informojn aparte de Boletín (informilojn, cirkulerojn, aniĝilojn, ktp). Krome, kiel decidite dum la pasinta kongreso, ekde ĉi tiu jaro ili ricevas ankaŭ la revuon Kontakto. Tio ĉio montriĝis grava allogilo, kaj fakte la nombro de junuloj kreskis de 18 ĝis 26 dum la interkongresa jaro.

La projekto eldoni propran informilon ne realiĝis pro la ankoraŭa malgrando de la HEF-junularo. Estas eble aperigi ĝin dum ĉi tiu jaro kiel neregulan cirkuleron pri junulaj aferoj, aŭ profiti ekde 1997 la jam ekzistantan eŭropan junularan gazeton Koncize. La decido dependos de la junuloj laborpretaj kaj de la kresko de la junularo dum la venonta jaro.

Peradoj

Jam de du jaroj HEFanoj abonas la revuon Eventoj pere de la madrida oficejo. La nombro de peritaj abonoj rimarkinde kreskis ĉijare. Simile, nun ni ankaŭ peras la kotizojn por UEA, por ĝiaj revuoj kaj por la Universala Kongreso.


HEF jam havas aliron al ĉiuj servoj Internet. Ĝia retadreso estas: esperanto@canaldinamic.es. Tiu ĉi sistemo plirapidigos la komunikadon kun asocioj kaj individuoj, kaj tre utilos por informado al la publiko.

Pri la 54a Hispana Kongreso, okazigita en Salou fare de niaj katalunaj samideanoj, detala kroniko aperis en Boletín n-ro 323.

La Estraro

9

Deziras Korespondi



Adreso: Jader Rodrigues da Silva; Rua Odilardo Silva, 1537, A-centro; Macapa-Amapa. CEP 68.906-410 Brasil.

23-jara ĉeĥino laboranta kiel tajlorino por virino. Ŝi kolektas bildkartojn de plej apartaj lokoj kaj interesigas kor. pri sportoj kaj vojaĝoj kun gehispanoj. Adreso: Gabriela Ponizilova; Ĉechy Pod Kosirem R9; O. Prostejov 798 58; Ĉeĥa Respubliko.

34-jara brazilano dez. kor. kun gehispanoj pri popolkulturoj, muziko, vojaĝoj, kino, teatro, folkloro ktp. Li parolas plurajn lingvojn kaj finis bazan Esperanto-kurson. Adreso: José Augusto Rodriguez Pereira; Rua Cambaúba 200/201; J.G. Ilha do Governador. Rio de Janeiro/RJ. 21.940-000 Brasil.

Tri komencantoj de Esperanta lingvo en la lernejo de Durham dez. kor. kun gelernantoj de aliaj E-Grupoj, unu el ili bibliotekistino. Adreso: Reetesh Saras; School House (Durham School); DURHAM CITY; England, U.K. -D H I 4-57 Anglio.

28-jara ŝtatoficisto, Esperanto-komencanto dez. kor. kun gehispanoj.

Esperanto-Grupo Hangzhou deziras starigi amikajn, komercajn kaj fratajn rilatojn individuajn kaj kolektivajn. Adreso: Hangzhou-a Esperanto Ligo; Room n-ro 504 Building 6, Xi Xi He Xia 33, Wen Er Road, Hangzhou. Postkodo 310012 China.

Pluraj lernantoj de "Baza Esperanto-kurso" de la instruisto Luis Jorge Santos Morales en la Instituto Winston-sales, en Kolombio, deziras korespondi kun diverslandaj esperantistoj. Adreso: León Montaña Villafañe; Apartado Aéreo 609. Palmira-Valle. Colombia S.A.



Viglas

la

movado

Nova libro

La redaktoro de *Boletín*, samideano Antonio Marco Botella, prezentis la 6an de aprilo en la kadro de la 51a SAT-Amikara Kongreso okazinta en Orly (Parizo) 5/8-4-96, sian novan libron *Laboristaj Kronikoj*, en kiu li priskribas eventojn kaj viverojn de laboristaj esperantistoj kaj ties E-asocioj laŭlonge de la komenciĝo de la nuna jarcento ĝis nia hodiaŭo. La libro, 146-paĝa, krom objektiva studo pri la hispana laborista E-movado skizas la rilaton inter tiu kaj la tutmonda movado, kaj grandtrajte rakontas interesajn epizodojn, de la «tragika semajno» de Barcelono en 1909, la aperon de socialaj ideologioj ligitaj al la esperantismo dum la jaroj tridekaj, intercivitana hispana milito, vivo en la sudfrancaj kaj nordafrikaj koncentrejoj de hispanaj ekzilitoj ĝis scenoj de la tutmonda mondmilito...

Laŭ opinio de unu el la plej elstaraj fakuloj pri la temo, D-ro Ulrich Lins: «pionira verko, tre longe atendita ne nur de hispanoj, sed ankaŭ de eksterlandaj interesigantoj, des pli ĉar ĝi dediĉas multe da spaco al la individuoj, sen kies sinferemo tiu movado ne povus ekzisti».

La libro, eldonita de SAT-Broŝurservo, estas akirebla en preskaŭ ĉiuj Libro-Servoj.

Senpaga ekzemplero

La printempa duobla numero de *Heroldo de Esperanto* enhavas detalan liston de ĉiuj plej gravaj feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto ĉie en la mondo.

La listo por 1996 detaligas datojn, adresojn kaj programojn, kaj priskribas pli ol 200 aranĝojn.

Oni povas senpage ricevi la supre menciitan duoblan numeron, *marpoŝte*, mendante ĝin ĉe la redakcio (Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (Torino). Italio.

Kiel konate, **Heroldo de Esperanto**, fondita en 1920, estas la plej populara gazeto en la internacia lingvo kaj estas eldonata de laŭleĝe registrita kultura societo sen profita celo.

A. Fighiera-Sikorska
Redaktorino

M. Diez Zocato

E-ferioj kun folkloro

Septembro estas nomata en Pollando "Ora Pola Aŭtuno" kaj tial la geesperantistoj el Kroskienko, urbeto en la Pieniny, Montaro kaj ĉe la pitoreska rivero Dunajec, organizas du dusemajnaj "Internaciajn Esperanto-Feriadojn kun Folkloro": de la 1a ĝis la 15a kaj de la 16a ĝis la 30a de septembro 1996. Oni loĝos en komforta ripozdomo en du kaj trilita ĉambroj kaj la plena pensio por dusemajna restado egalas al 250 US \$ aŭ egalvaloro. Okazos vizitoj al Zakopane, Krakovo, Wieliczka (la fama salminejo), flosado sur la rivero Dunajec (neforgesebla spektaklo!), folkloraj prezentadoj, rostado de ŝafo sur brulŝtiparo, promenadoj, ripozoj ktp.

Informoj: S-ino Stanisława Majerczak, ul. Kingi 6. PL-34-450 Kroskienko n/Wistokiem. Pollando.

Nova komputila inform-programo

"Informe sobre el Esperanto" estas la titolo de nova komputila inform-programo pretigata de samideano José Francisco Martín del Pozo. Fakte jam disponeblas prov-versio.

La programo celas informi la ĝeneralan publikon, kaj ofertas eĉ la eblecon aŭdi kelkajn vortojn por ke la eventuala interesito aŭskultu kiel sonas la lingvo. Ĉiuj interesitoj povas mendi ĉe la HEF.-oficejo ekzempleron de la prov-versio, se ili antaŭsendas diskedon.

Por uzo de la programo necesas nur ajna versio de "Windows". Tamen, por aŭskulti la prononcadon oni devas disponi la son-karton "SoundBlaster".



Premio

Klara Silbernik-1996

La Komisiono ĉiujare elektanta la Premion *Klara Silbernik* aljuĝis la ĉi-jaran al s-ino Mŭ Dolores Egea Estañ, de Callosa de Segura (Alicante), pro ŝia konstanta apogo kaj senlaca subtenado al sia edzo, José Mŭ Bernabeu Franco, nuna Kasisto de HEF, en lia strebado por Esperanto de la jaro 1937.

Mŭ Dolores Egea, flue parolas Esperanton, partoprenas en multaj hispanaj kaj internaciaj E-kongresoj kaj perfekte konas la esperantistan etoson, ne vane en sia gepatra domo ĉiam viglis bonaj esperantistoj. La Premion oni transdonos kadre de la 55a HEF-kongreso okazonta en Murcio, de la 12a ĝis la 17a de julio 1996.

La HEF-estraro kaj la Redakcio de *Boletín* gratulas la geedzojn Bernabeu-Egea pro tiu premio tute meritoplene al ili atribuita.

2a volumo

En 1995 EUROKKA eldonis la unuan volumon de VINILKOSMO-KOMPIL'. Nun la 2a volumo preskaŭ pretas kaj devus aperi fine de aprilo aŭ majo 96. Ĝia enhavo estos ankoraŭ pli diversstila ol la unua (de F-ino Emily Barlaston ĝis Piĉismo), kun novaj kaj ne eldonitaj muzikstiloj, famaj espartistoj kaj aliaj jus malkovritaj. Vere malkovrindaj muziknovajoj el Afriko, Sudameriko k.a. Ili nepre plaĉos al vi ĉiuj. Interesatoj povas peti rekte al ni aliĝdosieron: EUROKKA. Esperanto-Rok-Asocio; FR-31450 DONNEVILLE. Francio.

Prelego en Murcio

La 25an de aprilo prelegis en la *Rotary*-Klubo de Murcio nia samideano D-ro José Luis Perez Ovilo pri "Esperanto en la Rotaria aktivado", en kiu la preleganto klarigis al la Rotarianoj de Murcio kiel funkcias tiu Fako en la sino de la Esperanta Movado. La prezidanto de *Rotary*-Murcia D-ro Juan Manuel Arenas, kore dankis la eksplikojn de nia samideano kaj ankaŭ la liston de rotariaj eksterlandaj esperantistoj, kiun li ricevis por eventualaj estontaj kontaktoj. Li promesis studi la eblecon organizi Esperanto-kurson en la Klubo.

Esperanto-kurso ĉe Fakultato

La 10an de aprilo 1996, la sekretario de la E-Grupo "Jozefo Anglès" de Sant Cugat del Vallés, s-ro José Manuel Conde, prelegis pri Esperanto en la Fakultato pri Tradukado kaj Interpretado de Cerdanyola/Barcelona. Kiel rezulto de la prelego komenciĝis E-kurso por studentoj gvidata de la brazila cseh-instruisto Aristóphio Alves Filho.

Sama E-instruisto ankaŭ gvidas alian kurson en "Ateneu Rubirenc" de Rubi, kiun organizis la prezidantino de la E-Grupo de Sant Cugat, nia ŝatata samideanino Trinitat Garcia. Cetere, aliaj aranĝoj ankaŭ kontribuis al la disvastigo de Esperanto en tiuj urbetoj; 30-minutan programon pri Esperanto en Radio Sant Cugat kun intervjuo al niaj gesamideanoj T. Garcia, Conde, Aristóphio kaj Núbia Alves; Intervjuo en la loka Televido de Rubi al la urbestro de tiu ĉi urbo kaj al la prezidantino de la E-Grupo de Sant Cugat; konversacia kurso en Sant Cugat fare de la sekretario de la Grupo ktp

En Sant Cugat, okaze de la "Aŭtunaj Festoj" la esperantistoj de tiu ĉi urbetoj organizas ĉiujare Ekspozicion de Esperantaĵoj. Ili jam preparas la ĉi-jaran. Se vi emas sendi salukartojn por montri, ke Esperanto viglas, bonvolu adresi ilin al: Esperanto-Grupo Jozefo Anglès; Apartat 336; ES-08190 Sant Cugat del Vallés (Barcelona).



Hispana Esperanto-Federacio jam havas alireblon al ĉiuj servoj de Internet, kaj havos ankaŭ propran TTT-paĝon. Ĉi tiu rimedo plirapidigos la komunikadon kaj malpliigos ĝian koston.

La HEF-adreso por retroŝto estas:
esperanto@caualdinamic.es

Vi povas ekde nun uzi tiun adreson por rete sendi ion ajn al HEF.

Krome, ĉi-jare ekfunkcios propra komputila bultenejo de HEF, per kiu eblos al membroj, simpatiantoj kaj informpetantoj aliri al multaj diversaj tele-servoj.



Eldono de Poŝvortaro

Augusto Casquero de la Cruz

la 27an de julio okazis en El Puig (Valencia) kunveno de esperantisto por pritrakti la aferon de la nepre necesa eldonado de e-postvortaro. Estis prezentitaj diversaj ideoj kaj projektoj, inter kiuj la plej interesaj estis tiu de Luis Ojer, pacience prilaborita dum kelkaj jaroj, kaj tiu de Miguel Gutiérrez, kiu proponis profiti la gigantan laboron faritan de Fernando de Diego, kies Granda Vortaro Hispana-Esperanta enhavas 50.000 kapvortojn. Kompreneble la poŝtvortaro estus malgranda versio ambaŭdirekta.

Post longa diskuto, kaj nova kunveno en Valencia E-Grupo, oni decidis apogi ĉi lastan proponon kaj mendi tuj la laboron al Miguel Gutiérrez, kiu promesis havi la vortaron preta fine de la nuna jaro.

Necesas paroli pri la detaloj: formato, aspekto, prezo nombro da paĝoj, eldonrajtoj, ktp. Valencia E-Grupo mendos minimume 100 ekzemplerojn kaj s-ro Conejero, el Castellón, mendos por valoro de 100.000 pesetoj. Ankaŭ Fondajo Soler kaj la libroservo de HEF faros grandajn mendojn.

Ĉiuj aliaj interesitoj bonvolu kontakti tuj la Valencia E-Grupo, HEF aŭ Miguel Gutiérrez, por konvena kunordigado de la eldonkvanto.

Esperanto-fako

en la universitato

Augusto Casquero de la Cruz

Laŭ informo ĵus ricevita de la dekanino de la Fakultato pri Filologio de la valencia universitato, s-ino Carmen Morenilla, oni aprobis en la estrarkunveno de tiu fakultato la estigon de Instituto pri Modernaj Lingvoj, inter kiuj troviĝos Esperanto. Oni komunikis ĉi informon okaze de la disdonado de universitataj diplomoj inter la gelernantoj de la E-kurso okazinta en tiu universitato. La sukceso de la kurso estis tiel granda ke ĝi estimulis la fakultaton daŭre okazigi kursojn de la internacia lingvo. Finis la kurson ĉiuj aliĝintaj lernantoj, entute 20 oficilaj kaj 5 aŭskultantaj.

Literatura premio

Augusto Casquero de la Cruz

Okaze de la 7a Kongreso de Valencia Esperanto Federacio kaj Murcio en El Puig (Valencia), la 27an kaj 28an de Aprilo, samideanoj el Cheste (Valencio) informis pri la projekto de ĉestana entrepreno krei novan literaturan premion en Esperanto. La premiota aŭtoro ricevos du mil dolarojn. Ĉi premio verŝajne estos unu el la plej riĉe dotitaj en nia movado. Baldaŭ okazos kunveno inter la reprezentantoj de tiu entrepreno kaj lokaj esperantistoj por starigi la bazojn de la konkurso.



Entrevjuo duonvoĉe

Entrevjuis: Luis Serrano Pérez

Kiam jam forflugis pluraj jaroj post longa restado en Hispanio de samideano Ĝ.K. Fighiera, mi, kiel multaj aliaj hispanaj esperantistoj, tute ne volas forgesi la figuron de unu el la plej elstaraj figuroj de la E-movado, kiu, tiel lerte sciis kunlabori kun ni en gvidaj esperantistaj taskoj dum multaj jaroj kaj... gajni niajn korojn per malavara amikeco. Ni, do, revenas al li, ne nur por elvoki nian amikecon, kiu restas tiel fidela al li kiel antaŭe, sed precipe por aŭskulti lian doktan opinion pri la situacio de Esperanto en la mondo, ja li, konstanta dejoranto de *Heroldo de Esperanto*, certe konas, pli bone ol iu ajn alia, kiel statas nia movado.

Ĝian Karlo Fighiera, naskiĝis en Torino (Italio) en 1929. Kiel Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, dum ses jaroj li dejoris kaj tutjare vivis en ses sinsekvaj kongres-landoj. Post 17-jara dejorado kiel Vicĝenerala Sekretario de FUA AV en Bruselo, li laboris 10 jarojn kiel direktoro por Eŭropo kaj Proksima Oriento de OMT, interregistara organi-

zo kun sidejo en Madrido. Talenta organizanto kaj altnivela preleganto en Esperanto, fidela gardanto de la spirito de nia internacia lingvo sur paĝoj de unu el la plej gravaj gazetoj de Esperantio, al vi ni adresas jenajn demandojn:

1. Kvankam vi estas “migranta birdo”, homo kutime fluganta de loko al loko, ni, hispanaj esperantistoj, sciivolas... —Ĉu vi sentas nostalgion pri via restado en Hispanio kaj kiu estas la momento kiun vi plej agrable ŝatus elvoki?

—Mi estas profunde dankema al Hispanio, ĉar ĝi akceptis min ne kiel eksterlandanon sed kvazaŭ kiel unu el siaj filoj kaj permesis al mi labori en la lando dum deko da jaroj en interesa medio. Pro tio, mi sentas por Hispanio tutvivan ŝuldon. Ĉar mi vivis en Madrido, estas normale, ke miaj pensoj aparte turniĝas al ĝi. Mi tiel multe promenis kaj intense vivis en ĝi, ke kiam mi vizitas Madridon eĉ la ŝtonoj parolas al mi kaj memorigas min pri pasintaj eventoj.

La hispanaj jaroj eble estis la plej feliĉaj de mia vivo. En tiu periodo mi lernis novan lingvon kaj spertis novan kulturon; mi mense kaj sente riĉiĝis vivante inter la civitanoj kaj konante multajn noblajn personojn, ĉefe la madridajn esperantistojn, miajn plej karajn amikojn. Tiuj momentoj ne plu revenos kaj ni ne plu parolu pri ili, alie vi vidos min tre kortuŝita—.

2. Ni rigardas vin kiel dejorantan konstantan observanton de la esperantista aktivado en la mondo, de via privilegia loko... —Kion vi opinias pri la

nuna stato de Esperanto en la mondo, ĉu ĝia ŝajna stagnado devas maltrankviligi nin aŭ ni devas rigardi la movadon kun optimismo?

—Laŭnombre, la Esperanto-Movado sendube stagnas, sed kvalite en la pasintaj jaroj kaj ankoraŭ nun ĝi multe progresis. Mi ĉiam miras konstatante ke ĉiusemajne aperas du-tri novaj libroj en nia lingvo kaj ke ĉe ni la ritmo de persona partopreno en la internacia vivo estas senkompare pli intensa ol tiu de kiu ajn alia internacia movado.

Fakte, ni plue estas avangardo, eĉ elito — se la vorto ne sonas malmodeste —, ĉar ni interesiĝas pri idealo kaj pri internacia komunikado, abstaraktaj temoj por ordinaraĵoj, kies horizonto limiĝas al la ĉiutaga praktika ekzistado en ilia familia aŭ teritoria kampo, sen kiu ajn alia intereso, sen deziro lerni ion ajn novan. Aliflanke ni erare ĝis nun pensis, ke per niaj solaj fortoj ni povas konvinki la tutan mondon.

La fina sukceso de Esperanto dependas de du faktoroj:

1. la matureco de la historia momento, 2. nia propra agado. La unua ne dependas de ni. Neniu povas antaŭvidi la evoluon de la historio, same kiel neniu antaŭvidis la falon de ŝtat-sistemoj, kiuj aspektis fortegaj, antaŭ kaj post la mondmilito. La kreskanta internacia integriĝo aŭ profundaj ŝanĝoj en la politi-

kaj aŭ ekonomiaj ekvilibroj povas subite konsciigi la mondon pri la neceso de komuna lingvo. Sed neniu scias, kiam tio okazos. La dua faktoro, jes, dependas de ni. Per nia ĉiutaga agado kaj



uzado de la lingvo, per la flegado de nia kulturo, per la modelo de internacia vivo, kiun ni kreis kaj proponas, ni akcelas la politikan decidon oficialigi Esperanton. Ĉar la demando pri internacia lingvo povas esti solvata nur je politika nivelo, ne de privataj civitanoj aŭ de asocioj de civitanoj, kiaj ni estas.

Intertempe, ni fondis originalan diasporan socion, kiu ne konas landlimojn, ignoras lingvajn barojn, ne predikas sed praktikas toleremon kaj respekton al ĉies kredoj kaj kulturoj. En tiu senco, Esperanto jam venkis unu batalon—.

3. Kelkfoje ni legas en *Heroldo de Esperanto* certajn acidajn esprimojn kontraŭ la organo de UEA *Esperanto*... Kiel ni, la esperantistoj, devas interpreti viajn malsamajn vidpunktojn kaj kiaj estas la realaj diferencoj inter ambaŭ gazetoj?

—Dum 48 jaroj de mia esperantisteco mi agis en la kadro de UEA, kies Dumviva Membro mi estas. Nur UEA havas la forton, la financajn kaj homajn rimedojn por iom antaŭenigi Esperanton en monda kadro, kiel ĝi jam faris en

la pasinto. Miaj kritikoj rilatas al tio, ke UEA perdis sian antaŭan elanon, burokratiĝis kaj ne faras ĉion al ĝi eblan por la disvastigo de Esperanto. Pri tio mi samopinias kun nia mortinta Tibor Sekelj, kiu asertis, ke «UEA ĉefe laboras por UEA». Unu el la kaŭzoj estas la maltaŭga administrado de niaj financoj, kiu kaŭzis en la lastaj jaroj buĝetitajn (do, intencitajn) deficitojn de pli ol 700 mil guldenoj. Laŭ mi, tiu mono estus pli bone elspezita por la propagando de Esperanto. Jam kiel Estrarano de UEA mi atentigis, ke la demando pri ekvilibro de la kontoj estas solvebla per reformo de la Centra Oficejo, kaj per harmoniigo de la ekvacio servoj/ kotizoj. Por atingi tiujn celojn nepre necesas la kunlaboro de la oficistoj, ĉefe de la direktoroj de la CO: sen ili helpo estas senutile eĉ diskuti pri plibonigoj.

Bedaŭrinde, UEA ne ŝatas aŭdi pri fundamentaj reformoj kaj tial tri sinsekvaj redaktoroj de ĝia organo rifuzis miajn kritikajn kaj proponajn artikolojn. Tamen, la cenzuroj plaĉas al mi, ĉar ili donas al mi plian energion por insisti pri miaj rimarkoj, ĝis kiam oni almenaŭ serioze aŭskultos min—.

4. Antaŭ longe oni batalas por la oficialigo de Esperanto kaj oni prezentas antaŭ la mondo «perfektan gramatikon», tamen niaj plej saĝaj kompetentuloj ĉiutage diskutas pri la konveno modifi certajn gramatikajn punktojn... —Kion vi opinias pri tiuj kontraŭdiroj kaj ĉu ne estus dezirinda ke oni metu definitivan punkton al eventualaj reformoj de la baza Esperanta gramatiko?

—Laŭ mi, la rezisto kontraŭ Esperanto ne estas lingva. Ni havas firman gramatikon, konfirmitan de unujarcenta lingvouzo. Ĉio alia estas teorioj. Ankaŭ en la naciaj lingvoj la lingvistoj diskutas pri detaloj, sed iliaj personaj vidpunktoj ne tuŝas la esencon kaj la valoron de la lingvoj de ili pritraktataj—.

5. Ĉiutage venas al ni informoj pri la malkresko de abonantoj al la plej gravaj enlandaj kaj Esperantaj revuoj, amiko Karlo, bonvolu sincere informi nin... *Kiel fartas finance kaj ĝenerale Heroldo de Esperanto?*

—*Heroldo de Esperanto* fartas bone, eĉ se ĝia abonantaro stagnas. La gazeto akiris en pasintaj jaroj modernan teknologion, kiu ebligis limigi la kostojn. Cetere, la administra kaj redakta laboro estas farata senpage. La apogo, kiun HdE ricevas de la tuta movado estas granda kaj tio certigas ĝian pluan ekzistadon.

6. Kaj nun konkreta demando pri konkreta temo: —Kion ci celas per via raporto *Esperanto preter la jaro 2000a?*

—Okaze de la Eŭropa kongreso en Parizo (1995) mi verkis 54-paĝan eseon «*Esperanto preter la jaro 2.000a*». Ĝi celas doni unuecajn argumentojn al la esperantistoj por iliaj eksteraj rilatoj (artikoloj, intervjuoj, rebatoj, ktp). Tiucele, mi analizas en la dokumento la historian evoluon de la lingva problemo, la kostojn kaj aliajn malavantaĝojn de la nuna multlingvismo, la antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto, la tendencojn interne de nia

Movado kaj la vojojn de nia agado. La estraro de UEA rifuzis publikigi la verkon, ĉar opiniis ke estas maloportune paroli al nemovadanoj pri niaj internaj tendencoj. Mi pretis forigi tiun punkton el la verko, kondiĉe, ke ĝi aperu en la revuo de la Asocio, sed tiu ĉi mia kompromisa propono ne sukcesis nuligi la rifuzon. Mi nun esploras aliajn vojojn por eldoni la eseon—.

Per nia lasta demando ni reale nur deziras, ke vi ĝeneraligu, via opinie, tion kion vi konsideras nuntempe pli urĝa en la agado por Esperanta de niaj movadanoj.

Ni dankas nian samideanon kaj amikon Ĝian Karlo Fighiera pro tiuj opinioj kiujn ni submetas nun al la konsidero de niaj legantoj. Mi estas certa, ke granda parto el ni ricevos ilin kiel plian lecionon de klera homo. Dankon, amiko Karlo!

Esperanto kaj Esperantismo

Giordano Moya Escayola

1. Zamenhof abdikis la esperantistojn.

«Kial Ludoviko abdikis?» apartenas al la kolekto Ludovikito. Ĝi estas la dua volumo de leteroj de generalo Hippolyte Sebert al Zamenhof kaj enhavas

klarajn vidon pri la Ido-krizo kaj ties kaŭzoj.

Por kompreni tiun krizon necesas analizi la agadon de Zamenhof ĝis la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro en 1905. Zamenhof komencis la disvastigadon de Esperanto per sendado de enskriboj pri promesoj: «mi, sub,skrib,it,a, promes,as el,lern,i la propon,it,a,n de d-ro Esperanto lingv,o,n inter,naci,a,n, se est,os montr,it,a, ke dek milion,o,j person,o,j don,is publik,e tia,n sam,a,n promes,o,n. Sub,skrib,o:»

Kompreneble, Zamenhof neniam ricevis tiom da promesoj, sed fakte la lingvo E-o disvastiĝis kaj forte prosperis en Francio. La unuaj francaj esperantistoj estis prestiĝaj personoj, kleraj el intelekta medio kaj eĉ influaj ĉe la registaro. Ili pretendis, ke baldaŭ Francio oficialigu E-on kiel lingvon internacian.

Zamenhof en tiu unua fazo de la esperantismo neniam publike manifestis, ke E-o estas iom pli ol nur internacia lingvo, aŭ «à savoir: une langue commune à toute l'humanité», nur private kaj al iuj hebreaj amikoj. Pro tio, kiam li sendis la tekston por la baldaŭa Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro, okazis granda ŝoko. Oni ne akceptis la deklaron pri «interna ideo» kaj Zamenhof devis prisilenti la lastan strofon de la Verda Standardo.

En la sekvantaj kongresoj, la Dua en Ĝenevo kaj la Tria en Cambridge, Zamenhof ree pledis por la «interna ideo», sed jen el la teksto de letero de Hippolyte Sebert al Zamenhof (29-6-1913) pri artikolo de s-ro Beaufront. «En tiu artikolo via eksa *savonto* denove aludas

tion, kion li nomas via socie-mistika revo pri homaranismo, kiu, laŭ li (Beaufront) fariĝis poste *la esperantismo*.

«Vi (Z) scias, ke en 1906 en Ĝenevo li (Beaufront) intencis ĉion forlasi pro la homaranismo, kaj ke ni tion evitis nur helpe de la deklaro pri neŭtraleco de niaj esperantaj kongresoj, kiun mi (Sebert) adaptigis, kio kaŭzis la sovaĝan malamon de la *savonto* (Beaufront) al mi. (Sebert)» (1)


La franca movado tiam atingis sian kulminon (1905, 1906, 1907), sed alvenis la Ido-krizo precipe pro la kontraŭstaro al la «interna ideo» de Esperanto. Pli ol la duono de la gravuloj forlasis Esperanton kaj aliĝis al Ido. La grandaj esperoj pri baldaŭa oficialigo de Esperanto vaporigis. La ŝtataj francaj instancoj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj ŝanĝis sian favoron por E-o laŭ: «neniel nia administracio devas faciligi la disvastiĝon de lingvo internacia, kiu povos sukcesi nur malprofite de la franca lingvo».

El la influaj personoj, kiuj restis apogante Esperanton estis generalo Sebert. Generalo Sebert, vicepresidente de la granda Societo de Forĝejoj kaj Laborejoj de Mediteraneo (Société des Forges et Chantiers de Méditerranée) estis tre prestiĝa sciencisto kaj influa en la registara medio. Li propravole povis rekte viziti la ministrojn kaj paroli kun ili. Rilate Esperanton, li subtenis la Esperantistan Centran Oficejon, fonditan en 1905, kaj kun kvar dungitaj oficistoj kaj krome pagis multajn deficitajn de esperanto-aranĝoj kaj

eĉ de kongresoj. La Esperantista Centra Oficejo daŭris ĝis 1920.

En Francio la esperantistoj disiĝis. La plej multo el la gravuloj transiris al Ido. La ordinaraj esperantistoj restis favoraj al E-o, sed neniu akceptis la esencan celon de Zamenhof, la homaranismon.

Zamenhof pretendis forlasi la agadon por Esperanto por sin dediĉi nur al homaranismo kaj pro tio li deziris organizi en Parizo, (1914), kongreson pri



neŭtralismo (religia), sed ĝi restis nur deziro.

Meze de disputoj, lingvistaj kaj ideoj, Zamenhof alprenis la teniĝon abdikii la esperantistojn.

Sebert, en letero 28-2-1913, diras al Zamenhof: «klare estas, ke via decido retiriĝi de niaj vicoj, aŭ almenaŭ ne plu resti ĉe honorloko, estis inspirita al vi pro via deziro povi pli libere zorgi pri la disvastigo de viaj ideoj koncerne la uti-

lecon de la kreo de nova religia kulto, kun neŭtrala karaktero..."(2)

Kvankam en 1914 aliĝis al la neokazona Esperanto-kongreso (pro la militeksplodo) en Parizo 3.740 personoj, reale la esperanto-movado suferis gravan krizon. Restis minoritata UEA, kun individuaj aliĝintoj, fondita en 28-4-1908, fronte al Ido kaj akceptanta la «interman ideon».

En 1918 finiĝis la unua mondmilito. Zamenhof mortis en 1917. Generalo Sebert mortis en 1930, naŭdekunujara, jam sen gvida rolo en la movado, ja kiel dirite, la Esperantista Centra Oficejo funkciis nur ĝis la jaro 1920. Esperanto ne plu havis influajn personojn ĉe la registaroj. La ĝenerala opinio ne priokupiĝis pri lingvo internacia kaj des malpli pri fratecaj idealismoj. La Esperantomovado ignoris la forpasintan Ido-krizon, reale ĝi estis la kaŭzo de la nepublika, sed fakta abdiko de Zamenhof. En la kongreso de Krakovo (1912), Zamenhof diris: «Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo (3)». Post la milito, gvidate de Hodler kaj Privat forte reviviĝis, sed baldaŭ forpasis la adekvata etoso kaj velkis. En 1936 fondiĝis nova organizaĵo, Internacia Esperanto-Ligo (IEL), laŭ landaj asocioj kaj sen ideologio, maksimume la rutina kantado de La Espero. Fine, UEA estis reorganizita en 1947 en kunfandiĝo kun IEL. Alvenis la Lapenna epoko, kaj li interpretis la «interman ideon» per *humanisma internaciismo* (4), sed ankaŭ ĝi ne prosperis, kaj finiĝis kun la Lapenna gvidado. Jen la

realo de nia nuntempa esperantismo: Esperanto estas nur lingvo.

Antaŭ tiu perspektivo, kion ni faru, esperantistoj? Se ni propagandas E-on kiel nuran helpan lingvon, aliĝos neniu, por tio jam rolas la angla. Se ni ofertas nur la neŭtralecon de E-o, sen io pli, ni atingos la kontraŭstaron de la potencoj, kiuj jam oficialigis siajn lingvojn en la internaciaj instancoj. Ni ankaŭ ne povas fidi la favoron de la nepotencaj ŝtatoj, kiuj vere povos esti interesitaj pri nia lingvo, sed ili restas sub dependo de la potencaj. Alie, se ni laŭ romantikismo diras, ke per E-o ni forigos la militon, oni povas konsideri nin kiel naivuloj. En Hispanio mem oni militis tri jarojn, kvankam estis neniam lingva obstaklo por interkompreniĝo*.

La prezentado de E-o laŭ romantikisma vidpunkto de la komenco de nia dudeka jarcento estas jam ekstertempa, la sperto de du mondmilitoj, la naziismo kaj la stalinismo kune kun la aktuala senorientiĝo montras, ke la sociaj aferoj estas nesimplaj, sed tre kompleksaj.

Nuntempe, la sociaj problemoj jam planediĝis. Nova atom-nuklea milito detruos la homaron. La ekonomio tutmondiĝis. Aperas novaj problemoj nur aranĝeblaj mondscale. Tiel same la ekologia ekvilibro, kiel la distribuado de la krudaj materialoj, la aranĝo de ekonomiaj krizoj, kaj ĉe tiu de la sendungeco. Krome la ĉiea respekto de la homaj rajtoj. Kaj plie la solvo de la lingva problemoj per Esperanto.

La esperantismo de Zamenhof al kiu li donis la precipan celon unuigi la homaron fariĝas nuntempe la plej grava aktualeco, ne kiel idealismo, sed kiel

*Li parolis malbone de la savana ligno.

nepra neceso. La unuiĝo de la homaro estas jam morala devigo.

Ni, esperantistoj, delasu esti nuraj lingvistoj aŭ revuloj apartaj de la mon-problemoj. La lingvo E-o sen ideo-for-to ĝin impulsanta, restos stagna. Nia ideo-for-to devas esti la unuiĝo de la homaro kaj la lingvo E-o kiel ilo por atingi ĝin. Tia estis la celo de Zamenhof, kaj tia devas esti la celo de la esperantistoj.

(1) Kial Zamenhof abdikis? Pĝ. 248.

(2) Kial Zamenhof abdikis? Pĝ. 241.

(3) Originala Verkaro. Pĝ. 410.

(4) Ivo Lapenna. Elektitaj paroladoj kaj prelegoj: 11. Humanisma internaciismo kaj la Internacia Lingvo. Pĝ. 63.



Lingve

lama

kontrakto

(inter ILEJ kaj Eventoj)

Bernard GOLDEN

Jura stato de kontrakto kun gramatika eraro

Delikata demando por membroj de la Esperanta Jura Asocio estas: ĉu validas kontrakto inter du Esperanto-organizaĵoj, se en la teksto de la dokumento

enestas grava gramatika eraro? Ĝis la tempo, kiam la juristoj havos okazon ekzameni la aferon kaj interkonsiliĝi, mi prezentos la faktojn, por ke la publiko en Esperantujo povu tiri la proprajn konkludojn.

La unua publikigo de la kontrakto

Laŭ mia scio la kontrakto aperis la unuan fojon en publikigita formo en la organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI): *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), 3/1993, pĝ. 19. Jen do komenciĝo de la unua paragrafo.

Kontrakto pri kunlaboro

kio ekestas inter ILEI (1034 Budapest Esó u. 7.) kaj la Redakcio de *Eventoj* (1675 Budapest pk. 87.).

1. Ambaŭ partneroj konsentas, ke:

1.1 Lingvokurso, kie oni instruas nur la lingvon kaj ne donas la necesajn movadajn konojn, preskaŭ certe rezultas la malaktiviĝon de la kursano, kion ĝenerale sekvas la neuzo kaj poste la forgeso de la lingvo.

La kontrakto estis subskribita en Budapeŝto la 26an de marto 1993 fare de Stefan MacGill, la reprezentanto de ILEI, kaj László Szilvási, la redaktoro de *Eventoj*.

Tuj, kiam mi rimarkis la eraran uzon de la netransitiva verbformo “rezultas” antaŭ la akuzativigita substantivo “malaktiviĝon”, mi informis la subskribintojn de la kontrakto, porke ili povu, sen plua prokrasto, ĝustigi la gramatikan eraron, skribante en reviziita versio de la kontrakto “rezultigas la malaktiviĝon”. Estas evidente, ke “rezulti” povas havi rektan objekton, nur se estas aldonita al ĝi la transitiviga sufikso “-ig”.

La funkciuloj de ILEI kaj la redakcio de *Eventoj* ambaŭ struktape rifuzis konfesi, ke memevidenta eraro pri verba transitiveco troviĝas en ilia kontrakto, kaj, montrante hontindan senrespondecon, ignoris miajn leterojn pri tiu temo.

La dua peka apero

La redakcio de *Eventoj* publikigis la saman kontrakton sur pĝ. 1 de n-ro 80 (2/junio 1995). La erara verbformo “rezultas” ne estis ĝustigita!!!

Kiel oni devas uzi

la verbon “rezulti”

Pruvon, ke ja estas eble primajstri la uzon de la verbo “rezulti”, prezentas du frazoj aperantaj en la sama numero de IPR, kiu enhavas la mise redaktitan kontrakton. Ambaŭ frazoj, sur pĝ. 16, estis verkitaĵoj de la elstara pedagogo Géza Kurucz.

a. (netransitiva uzo):

«El kio do rezultas la diferenco ŝajne negativa kompare kun la aliaj lingvoj?»


b. (transitiva uzo): «Ni ne tro vipu tiujn, kiuj laboras super siaj fortoj, ĉar tio rezultigas nur antaŭtempan foriron el la movado».

Oni ne devas esti diplomita lingvisto por ekvidi la paralelajn interpartojn de frazo “b” kaj la lama partoj de la kontrakta frazo.

b. «ĉar tio rezultigos nur antaŭtempan foriron».

K. «preskaŭ certe rezultas la malaktiviĝon» — Ĝi devas teksti: «preskaŭ certe rezultigas la malaktiviĝon».

Mi finas mian pritrakton de tiu ĉi temo per lasta demando: kial la respondeculoj de ILEI kaj EVENTOJ obstine rifuzas ĝustigi la eraron en la kontrakto?



Kio do pri la Esperanta Semajno?

23

Luis Serrano Pérez

Ĉar mi supozas, ke multaj gesamideanoj ankoraŭ neniam aŭdis paroli pri la «Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno» (IKTES), kaj tiuj, kiuj jam aŭdis pri ĝi, estas certaj pri ĝia konsisto, mi penos tion klarigi tuj sekve:

La *Esperanto-Semajno* ne estas kongreso, konferenco nek io simila, ja en ĝi neniam oni diskutas pri bilancoj, buĝetoj, membraro, rilatoj kun institucioj ktp normale debatitaj en tiuj kunvenoj. Kompreneble, kiam mi asertas tion la leganto tuj povas pensi, nu, el kio konsistas *Esperanto-Semajno*? La respondo estas tre facila: en tiu kultura esperantista turisma aranĝo oni faras ĝuste tion kion jam la titolo anoncas, t.e. kulturo kaj turismo. Ni ĉiam klopodas, por ke dum tiu speciala semajno abundu en ĝi prelegoj kaj debatoj pure priesperantismaj kaj pri plej diversaj temoj. Ni ankaŭ celas malkovri novajn talentojn en tiu bela kaj ĉiam interesa fako kia estas la prelego. Paralele ni kutimas ankaŭ inviti prelegi talentajn spertajn esperantistojn, kies vervo povas entuziasmigi la ĉeestantaron kaj plialtigi nian kulturon.

Alia aspekto interesa de nia programo estas la instruado de Esperanto, preskaŭ ĉiam per «la rekta metodo», kiun tiel majstre regas s-ino Carla de

Lorenzi, per kies instru-sistemo kaj dolĉa parolmaniero, la Esperanta gramatiko ŝajnas pli facila kaj komprenebla. Do, jen allogo por komencantoj, kiuj deziras bone lerni la lingvon, kio ankaŭ taŭgas al tiuj samideanoj kiuj jam konas la lingvon sed deziras pli perfekte lerni ĝin. Jen do kiel la *Esperanto-Semajno* kontribuas al la disvastigo kaj lernado de Esperanto.

Ankaŭ interesa estas la *turisma* parto de la aranĝo. Laŭlonge de tiu *Semajno* oni organizas ekskursojn al plej pitoreskaj lokoj. Kelkaj el ili estas tuttagaj kaj aliaj duontagaj: ĉiam estas agrable koni la historion kaj la kulturon de la medio en kiu malvolviĝas nia Esperanta aranĝo. Cetere, veturi aŭtobuse en bona harmonio kaj la esperantista etoso de la «semajnujoj» ĉiam estas ĝojige kaj ebligas interkonatiĝi kun eksterlandanoj aŭ aliaj kunveturantoj kaj konversacii distre kaj plaĉe. Tiel agrable, ke ofte oni sentas ke la tempo flugis kiam oni kons-tatas, ke denove ni revenis en la hotelon!

Krom tiuj komentitaj programeroj ekzistas aliaj aranĝoj kiujn multe ŝatas la partoprenantoj, ekz. tiuj speciale amuzaj okazantaj post la vesper-manĝo: recitoj de poemoj, prezentado de videodiskoj, rakontoj pri la impresoj de la pasintaj kongresoj, seminarioj ktp. dumsomere...

Ni ĉiam organizas ĉi tiujn *Semajnojn* ekstersomere, kiam la esperantistoj jam ĝuis sian libertempon kaj partoprenis en naciaj kaj universalaj kongresoj... Nia celo estas ĝui la plezuron de trankvilo, paco, ne penigaj lernadoj, gustumi la ĉarmon de la kulturo kaj iomete revii en esperantistaj konkeroj; ĉu oni povas peti ion plian?

Eble, kelkaj el miaj legantoj pensos kiel eblas tiu miraklo? La respondo estas facila: ni estas areto da fervoraj esperantistoj, granda parto el ni emeritaj, kiuj riskas sian propran monon por okazigi tiun aranĝon, kio en si mem estas ja laŭdinda ago por disvastigi nian internacian lingvon. Ni ne celas profiton, nur revigligon de Esperanto, kiu laste iomete lamas...

Do, karaj gesamideanoj kaj amikoj, ne hezitu kaj venu al nia venonta *Esperanto-Semajno*, paradizo de la trankvilo. La mono nur utilas kiam oni ĝin uzas en tio plaĉa al nia koro. La subskribinto nur estas simpla kunlaboranto en tiu paca aranĝo, tamen se vi deziras aldonaĵajn informojn adresu al mi leteron en: Font Nova, 32. 08202 SABADELL (Hispanio), telf. (93) 72.75.021 kaj estu certa ke vi trovos je via dispono samideanon.

Literaturaj Konkursoj

Memoru ke vi povas partopreni en du literaturaj konkursoj: *Fundación Esperanto* (Boletín 324, 9 p.) kaj tiu de la Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (Boletín 325, 32 p.). Partoprenu!

Libroservo de HEF

Apartado 119
47080 Valladolid



Legi estas vivi

Atentu!

De la 16a de julio ĝis la 1a de septembro la libroservo de HEF estos fermita.

Petu ĝian katalogon!

Radio

Informa Servo de HEF

Se vi volas ricevi regule la plej freŝajn informojn pri Esperanto en radio (horarojn, frekvencojn, novaĵojn, programojn...) simple turnu vin al la Informa Servo de HEF-oficejo.

Jen plia paŝo en la liverado de novaj senpagaj servoj por la membroj de HEF. Jen plia paŝo en la bona direkto.

Helpu nin kreski plu!

HEF
BONAJ SERVOJ

Kvazaŭ defende de la ikso-alfabeto

Post relegado de *Lingva Fajrero* (Boletín 324) mi volas defendi la malmulton defendeblan rilate la t.n. ikso-alfabeto.


Ikso-alfabeto estas propono uzi, anstataŭ la ĉapelitaj literoj, literojn senĉapelajn plus x. Mi konsentas, ke ne nur praktike, sed ankaŭ prin-

cipe, ni uzu, kiam eble, niajn ĉape-

lojn. Tamen, se ni uzas komputilajn programojn kiuj ne ebligas tian uzon, estas preferinda la ikso-alfabeto (*) al la uzado de kunan h-on (ho-alfabeto). Kial?

Imagu: vi ricevas ASCII-dosieron kie oni ne povas uzi ĉapelojn. Via korespondanto uzis ho-alfabeton. Se vi deziras reuzi tiun dosieron, vi povas ordoni al la komputilo anstataŭigi ĉiujn grupojn c+h per ĉ. Nu, ĉu ĉio bonordos? NE! Kiam la komputilo trovos *chapelon*, ĝi tuj skribos *ĉapelon*; sed kio okazos, se ĝi trovos *senchava*? Tiu vorto iĝos *senĉava*!! Kaj krome, se oni uzos neesperantajn vortojn en la teksto, ili ankaŭ ŝanĝiĝos. Ekzemple, se vi parolos pri Churchill, lia nomo iĝos ĉurĉill...

Kio okazas kiam oni uzas ikso-alfabeton? Pro tio ke ne ekzistas vortojn esperantajn kiuj enhavas ikson, la komputilo neniam eraros dum la anstataŭigo de literoj. Krome, la literkombinoj cx, gx, ktp. estas kutimaj en nenia lingvo (almenaŭ laŭ mia scio). Tio ne estas nur mia persona opinio; multaj komputiluzantoj same opinias. Se oni vizitas esperantlingvajjn TTT-paĝojn de Internet, plej multaj el ili uzas ĉi tiun sistemon Esperanta alfabeto. Bonvolu kompreni, ke ĉiun alian uzadon de ikso-alfabeto mi taksas deformadon de nia lingvo!



(i.a., tiuj de UEA kaj la Flavaj Paĝoj). Iuj krome oferas la eblecon vidi niajn ĉapelojn, sed nur se la Internet-naviganto jam posedas Latin3-litertipon (kiu enhavas specialajn literojn, i.a. la esperantajn.

La celo de mia artikolo estas subteni la ikso-alfabeton kiel pro-
vizoran solvon al la problemo de programoj kiuj ne ebligas al ni la uzadon de la propre

(*) Tiucele ankaŭ uzeblas ipsilon-alfabeto, tio estas, anstataŭado de ĉapeloj per aldono de y, tiel: ĝ=gy...; eĉ vavo-alfabeto uzeblas (ĉ=cw, ĝ=gw).

Intervjuo al Prof. Selten

26

La Redakcio

Reinhard Selten, Nobel-94 kaj elstara esperantisto, vizitis Murcion je la komenco de pasinta monato marto. Tiu ĉi eminentulo estis Nobelpremiita pro la disvolvo de la *Ludoteorio*, ĉar laŭ la Sveda Akademio de Sciencoj «ĉiu ludanto devas disvolvi strategion bazitan en la antaŭvidebla agado de la aliaj ludantoj... kaj tiaj strategiaj interagadoj ankaŭ karakterizas multajn ekonomikajn situaciojn, kaj la ludoteorio rezultis tre utila por la ekonomikaj analizoj». La *Ludoteorio* estas branĉo de matematiko kiu analizas konkurajn situaciojn, kies disvolvo ne nur dependas de la elekto, eĉ de la sorto de unu ludanto antaŭ pluraj alternativoj, sed ankaŭ de tiuj kiujn decidis la aliaj partoprenantoj aŭ ludantoj. Tial, temas pri la strategio scii bone elekti...

Nia murcia samideano, José Luis Pérez Ovilo, intervjuis Prof. Selten pri certaj aspektoj de liaj ludoteorioj kaj ankaŭ pri Esperanto, en kies asocioj li membrigis jam en la jaroj kvindekaj. Jen la saĝaj demandoj de nia murcia kolego kaj la sukaj respondoj de Prof. Selten:

D-ro Perez —Ĉu oni povas apliki la ludoteorion al plej diversaj kampoj?

Prof. Selten —La Ludoteorion oni povas apliki al la simplaj ludoj kaj ankaŭ al sciencaj teorioj, ekz. en la ekonomika kaj biologia kampoj, en kiuj oni analizas ludoteoriajn modelojn kiuj estas simpligitaj bildoj de realaj situacioj. El la analizo de tiuj modeloj oni ne eltiras agadkonkludojn por iu konkreta situacio. Kion reale oni atingas estas scioj pri situacioj kaj kompreno por eventuala agado pli racia. La *Ludoteorio* pritraktas situaciojn en kiuj diversaj elementoj interagas kaj el tio naskiĝas matematikaj modeloj. En kelkaj kazoj oni povas eltiri ion el vidpunkto praktika. La utilo de la *Ludoteorio* havas sian plej bonan aplikon en situacioj en kiuj oni povas prepari la regulojn, kaj por tio oni bezonas la ludoteoriulojn, kiuj fakte estas tiuj kiuj povas krei la metodon.

D-ro Pérez —Sed en mondo tiel kompleksa kiel la nia, oni ne havas, ĝenerale, tiun eblecon

Prof. Selten —Mi opinias, ke ekzistas multaj ebloj por fari tion. Tre ofte oni starigas regulojn pere de leĝoj ktp., kaj konstareble estas ke nia socio estas regulata. En ĉiu lando oni devas krei bonajn regulojn por specifaj cirkonstancoj. Jen la labormaterialo de la *Ludoteorio*; en tiu kampo oni povas multon fari.

Mi kreis modelojn pri ekonomika teorio, sed mi ricevis la Nobelpremion precipe pro bazaj konceptoj kiuj helpas prepari kaj perfektigi ilin.

D-ro Pérez —Vi diris, ke se iu entrepreno (firmo) uzus strategiojn el la *Ludoteorio* ĝi preferus gardi ilin sekrete. Tuj mi ekpensas pri militistoj.

Prof. Selten —Militistoj aplikas jam la *Ludoteorion* por certaj celoj, sed ili ne tute bone scias kion ili faras. Mi diru tuj, ke mi ne scias kion konkrete ili faras aŭ se tio estas efektiva, tio kion mi certe scias estas ke kelkaj personoj laboras en tiu kampo en la Usona registaro. Sed la *Ludoteorio* konjektas ke la homo estas racia estaĵo, kaj tio ne estas vero. La granda tasko por nia estonto estas adapti tiun teorion al tiu fakto.

D-ro Pérez —Vi estas la kvara esperantisto ricevinta la Nobel-premion, ĉu la *Ludoteorio* konsilas lerni Esperanton?

Prof. Selten —Lerni Esperanton, probable, ne helpas atingi la Nobel-premion, sed sendube ĝi disvolvas la intelektan vivon de la individuo. Esperanto lernita dum la junaj jaroj faciligas la lernadon de aliaj lingvoj.

D-ro Pérez —Ĉu oni povas kvantigi historia-lingvistikajn faktorojn kiel la ŝanĝo-prestiĝo aŭ la utilo de lingvo influanta en sia reprodukto-sukceso?

Prof. Selten —Jes. Ekzemple, la sociolingvisto William Labov malkovris, ke en certaj okazoj dialektoj evoluas tre rapide influate de sociaj faktoroj. En la insulo Martha's Vineyard, de Usono, la loĝantoj malvolvis specialan dialekton kiam ili volis diferencigi sin de la riĉuloj ĵusvenintaj en la insulon por akiri libertempajn rezidejojn. Dialektoj estas utilaj por indiki ke oni ne apartenas al difinita grupo. La lingvo ne nur havas kiel funkcion la interkomunikadon, sed ankaŭ por indiki la sociajn diferencojn. Ankaŭ tiu ĉi lasta povas esti utila en alia aspekto: se vi uzas dialekton kun personoj samdialektaj vi estas pli proksima al ili, kaj tial ili sin sentos pli inklinaj helpi vin ol se temas pri personoj ne parolantaj tiun dialekton.


D-ro Pérez —La internacieco de la angla, ĉu ĝi jam atingis sian nerevenan punkton?

Prof. Selten —Ne, kaj ni, la esperantistoj, havas sendube grandan esperon: evidentas ke la lernado de Esperanto faciligas la postan lernadon de fremdaj lingvoj. Esperanto devus sukcesi kvankam nur estu pro tiu rezono. Sed por realigi tion estas necese ke sufiĉe alta nombro da personoj sciu Esperanton. Oni ne devas esti esperantisto nur por la sukceso de tiu ideo. Gravas ankaŭ tiuj ideoj kies facilan venkon oni ne povas esperi. Se io estas bona morale, ankaŭ ĝi estas bona eĉ se ĝi ne triumfos. Ke la «fina venko» ne estu antaŭvidebla, ne sufiĉas por ne kredi je tiu idealo.

D-ro Pérez—Ĉu la esperantista kolektivo en si mem havas specialan allogon?

Prof. Selten—Sen ia ajn dubo! Bedaŭrinde ju pli mi maljuniĝas des pli malfacila estas por mi ĝui de tiuj allogoj pro absoluta manko de tempo. En mia junaĝo mi estis multe pli agema!

La Redakcio de *Boletín* dankas niajn talentajn samideanojn kiuj tiel alte sciis dialogi por niaj legantoj. Dankon!



Intervjuis: VELUS

Nunafoje ni prezentas, en tiu ĉi rubriko, entuziasman samideanon el urbetto Callosa de Segura (Alikanto), kie li naskiĝis kaj plu rezidas. Li estas s-ro José M. Bernabeu Franco, kiu lerninte Esperanton dum nia intercivitana milito, ĉiam fidele aktiv(is)as por nia afero, en kiu li diligente kaj tre kompetente responsadis pri kelkaj el ĝiaj postenoj, en diversaj periodoj de lia vivo.

Lin mi ekkonis, kaj ni ambaŭ tuj simpatiis, jam en la jaro 1951, dum la unua evento niamovada, oficiale orga-

nizita en nia lando post bedaŭrinda interfrata milito, nome la memorinda «12a Hispana Kongreso de Esperanto» solene okazinta en la kataluna urbo Terrassa.

De tiam, jam forpasis longa tempo, dum kiu lia strebado por Esperanto plurafoje alternigis tagojn de esperiga prospero kun aliaj de relativa stagnado, sed ja persistaj fido kaj fervoro por la noblabela idealo de D-ro Zamenhof neniam velkis ĉe lia spirito, kion implicite konfirmas mem s-ano Bernabeu Franco en sia afabla respondado al la jenaj punktoj de tiu ĉi sekva intervjuo:

1).—*Kie, kiam, kiel kaj kial vi kontaktis kun Esperanto, kaj kiu motivo impulsis vin aktivi en ĝia movado?*

—Mi eklernis Esperanton, kiam mi estis 17-jara, dum la intercivitana milito nialanda. En mia urbetto Callosa de Segura loĝis kelkaj esperantistoj, sed pro militaj postuloj ili devis forlasi ĝin, por plenumi soldatan rolon, aŭ dejori en responsaj fakoj profesiaj. Inter ili estis germana rifuĝinto eskapinta el la Hitlera politiko. Li estis tre klera esperantisto, kiu per sia persona afableco envojiĝis min, kaj aliajn junajn amikojn, al plia kaj plua lernado de la internacia lingvo.

2).—*La subskribinto proprasperte opinias, eble ne prave, ke la Esperanto-organizacioj ĉiam devus maksimume stimuli la membrecon respektive la kontinuecon de iliaj geasociitoj, precipe per ne altaj, facile atingeblaj jarkotizoj, kompreneble se la cirkonstancoj tion*


*permesas. Nu, el via funkcio kiel kasis-
to, kian kriterion vi havas tiurilate?*

-La Esperanto-organizacioj ja devus laŭeble klopodi en la aranĝo de alloga, stimula plano, por ke iliaj gemembroj havu okazon ĝui, krom atingo de maksimuma perfekteco lingva, ankaŭ plej ĝojigan kunvivadon en frateca asocia etoso, ĉu pere de sportaj ludoj, ĉu helpe de diferencaj amuzoj, en kiuj la Zamenhofa lingvo havu eksplicitan protagonismon.

Cetere, mi grandtrajte koincidas kun via opinio, laŭ kiu la diversaj Esperanto-Asocioj devus starigi modestajn, eble eĉ simbolajn membro-kotizojn, por tiel faciligi la varbadon de novaj gesimpatiantoj, kaj samatempe iel favori la kontinuecon, de la malnovaj gemembroj, en la respektiva Esperanto-asocio aŭ klubo. Por kovri eventualan deficiton de tiuj asocioj aŭ kluboj esperantistaj, probablaj enspezoj povus veni al ili tra helpa subteno de aŭtoritatoj, ankaŭ pere de loterio-disvendado, aŭ el aliaj vojoj. Tamen, ega persisto de la responsuloj de la koncernaj Esperanto-kluboj ja estas tre necesa, por atingi tiujn celojn.

3).—*Dum via jam longa esperantis-teco tre probable vi spertis iun kuriozan anekdoton, por ĝin rakonti al niaj gelegantoj. Ĉu vi afable volas rememorigi ĝin?*

—El longa travivado en Esperantaj medioj, venas al mia memoro la tiam



50-jara sveda korespondantino mia, sanino Anna Guillard, kiu donacis al mi la E-verkon *Verdaj Donkijotoj*, kaj trovis por mi laboron en la sveda urbo Linkoping. Mi ne povis plenumi nian deziron, ĉar reveninte el la batakkampo, tiam mi 18-jara, ne estis eble al mi fuĝi al Svedujo, kio ja restis mia iluzia revo. Alia neforgesebla rememoro, nome estas mia partopreno en la 44a Norvega Esperanto-Kongreso, okazinta en Tromsø, urbo situanta interne de la Antarkta Polusa Cirklo, kiun mi vizitis en la monato julio de 1975.

Dum kelkaj tagoj mi ĝuis tie «La noktomezan sunon». Tiukaze, prof. Stop-Bowitz, en sia faka profesio, informis pri la novaj jarmilionaj montoj, kuŝantaj kontraŭ la kontinentaj montoj. Hazarde mi renkontiĝis, en tiu kongreso, kun mia amikino Irene, el Pollando, kiu antaŭe estis mia gastigantino dum pluraj tagoj, renkontiĝo vere surpriza kaj tre ĝojiga.

4).—*Kiel vi procedus, por ke la enlanda Esperanto-Movado pozitive akiru la deziratan disvastigadon, kiun ja meritas ĝia pragmata idealo de interpopola vehiklo de komunikado?*

-Ne estas facila nunatempe la vojo al pozitiva disvastigado de nia lingvo. La aktualaj konfliktoj tutmondaj ne helpas la pacocelan inklinon atingi plej internacian «Rondon familian», sed ja Esperanto daŭre kaj sukcese funkcias en diversaj kampoj, kaj la kontinua eldona-

do de plej diversaj verkoj pruvas la vivantecon de tiu lingvo. Ni, konvinkite de la alta valoro de Esperanto, promocias ĝian lernadon en kursoj, parolaj aŭ korespondaj, gvidataj de asocioj aŭ privatuloj, kaj kvankam foje «unu semo perdiĝas...», tamen jen ni rimarkas kun plezuro, ke ekzemple tre juna esperantisto, kun dotoj de inteligenta verkisto, aperas en nia Esperanto-Movado, kaj krome li atingas la rangon de Akademiano. Fakte ni konstatas, ke nia lingvo estas la plej taŭga vehiklo por studado de aliaj idiomoj. Aldone ni havas la bildon de filologo, kiu studas Esperanton kiel lernanto, kaj tuj sekve li regas la lingvon kun altakvalifika sperto, tamen ne kun samanivela parolkapablo pro logika manko de praktikado. La hegemonio de iu ajn nacia lingvo ne povas regi sur la aliaj, nur Esperanto povas ilumini veran internacian interkomprenadon. Hele brilas nia estonteco!



Korekto de eraroj


En la lasta numero de *Boletín-325*, pro miskompostado, enŝoviĝis jenaj eraroj en la artikolo titolita *Ankoraŭ pri R. Schwartz kaj alio*, pĝ. 21:

1)La artikolo estis verkita de Antonio Marco Botella kaj ne de René de Lajarte.

2)La nomo de la raportisto de *Paris-Esperanto*, René de Lajarte, devus aperi tuj je la fino de sia reproduktita raporto.

3)La resumo kaj konkludoj de la tri artikoloj pri Raymond Schwartz publikigitaj en *Boletín* 319, 321 kaj 325 devus aperi je la fino de la artikolo de ĉi numero laste citita kaj ne aparte.

Ni petas senkulpigon al nia legantaro.



Anigu novan membron kaj ricevu donacon

Karavano al Prago kaj Slovakio

Valencia E-Grupo organizas ĉi bus-vojaĝon al la UK laŭ jena programo: la 13an de julio ni forveturos el Valencio por alveni en Niza (Francio) kie ni tranoktos en hotelo. La 14an alveno kaj tranokto en Venecia (Italio). La 15an alveno al Poprad (slovaka paradizo) ĉe la belegaj Tatraj Montoj. Tie ni ĉeestos la 6an European E-Forumon ĝis la 20a, kaj ĝuos Viziton al la glaciĝitaj grottoj, flosado tra la kanjonoj de la rivero Dunajec, Vizito al al montaraj lagoj, promenado tra la arbaregoj.

En la prezo de la vojaĝo estas inkluzivita ĉio okazonta en Poprad (loĝado, manĝado, kongreskotizo, ekskurzoj...).

La 20an alveno al Prago. Tie ni kongresos ĝis la 27a, kiam ni forveturos al Zurich (Svislando). La 28an alveno al Nimes (Francio) kaj la 29an al Valencio.

Dum la restado en Prago eblis organizi ekskurson per nia propra aŭtobuso (ĉu al Vieno?). Prezo de la vojaĝo 70.000 ptoj. *Nur estos loko por la 40 unuaj mendantoj!!!*

Omaĝe al Amalia Núñez Dubus

31

La Redakcio

Al nia Redaktejo venis el Germanio la novaĵon pri baldaŭa reeldono de la verko *Dekdu poetoj* (1934): unu el tiuj dekdu estis nia elstara poetino Amalia Núñez Dubús. Nia projekto estis omaĝi ŝin venontjare por soleni la 20an datrevenon de ŝia forpaso per reprodukto en *Boletín de multnombraj beletraj artikoloj kaj poemoj iam publikigitaj kaj bedaŭrinde ne tro konataj de la nunaj esperantistaj generacioj*. La anoncita novaĵo instigis nin anticipi nian projekton por iamaniere indiki al la legantoj de la reeldonota libro, ke la verkado de Amalia ampleksas beletrajn horizontojn pli vastajn kaj brilajn ol tiuj aperontaj en la menciita leginda verko.

Amalia Núñez Dubús naskiĝis en Pamplono en 1889 kaj esperantistiĝis en 1911. Telegrafistino unue kaj poste profesoro en duagrada lernejo, ŝi publikigis originalan verketon *Eterneco* kaj kunlaboris en gravaj E-revuoj per interesaj beletraj artikoloj kaj poemoj. Ŝi ricevis la Unuan Premion en Literatura Konkurso okazinta en Zaragozo en 1954, kaj post rekomendo de HEF-sembleo verkadis *Hispanan Antologion*, bedaŭrinde nepublikigitan pro financo-manko. Kelkaj el ŝiaj poemoj aperis en *Dekdu poetoj* kaj en *Esperanta Antologio*.

Ni komencas hodiaŭ la republikigon de de ŝia verkado per unu el ŝiaj poemoj originalaj:

Siringoj! Siringoj!
Florsimbolo: Unua amemocio

Freŝa siring' ornamanta
mian tablon dum labor',
ho, kiom da rememoroj
vekas en mi via flor'.

Lancojn formas la folioj
kaj krucetojn la petal',
krucetoj de Fasto-tempo
etaj lancoj de batal'.

Vin vidante, mi la scenojn
infantempajn revas tuj
kiam lerte mi surgrimpis
al maljuna siringuj'.

Kaj sub kiso de la suno,
meze de flor' kaj foli'
ravis min la nekonata
«Unua amemoci'».

Mi nek grimpas plu sur l' arbon
nek sopiras antaŭ viv',
sed de juna tempo estas
via parfum' elvokiv'.

Kaj, laŭ dum la dolĉaj jaroj
jam pasintaj pro domaĝ',
kantas vi pri am' kaj revoj
kaj printempo kaj junaĝ'.

Kaj tuj post tiu originala poemo jen alia, tradukita, el la fama hispana fabloverkisto Tomas de Iriarte:

La flutista azeno

Apud la herbejoj
de mia vilaĝ'
pasis azeneto,
sed nur pro hazard'

Fluton ĝi ekvidis
de paŝtista knab'
tie forgesita,
sed nur pro hazard'

Al ĝi proksimiĝis
la azen' por flar',
blovon ĝi eligis,
sed nur pro hazard'

La blovo la fluton
trakuradis ja
kaj la fluto sonis,
sed nur pro hazard'

Ho, l'azeno diris,
kia luda rav'!
Mi artisto estas,
flutisto sen par'

Ekzistas en mondo
verkistoj —amas'—
kiuj foje trafas
sed nur pro hazard'.


Tomás de IRIARTE (*)
Trad. de Amalia Núñez

(*) Hispana fablisto (1750-1791) pli originala en siaj fabloj ol Samaniego, ĉar li ne nur alprenas grekajn kaj latinajn temojn. La ĉefpenso aŭ «moralo» de tiaj verketoj estas ĉiam priliteratura regulo aŭ konsilo. Pro tio ĝia komuna titolo.



Boletín

mi amas vin



Nekrologo

Kun granda ĉagreno ni sciigas al nia legantaro, ke la 30an de januaro forpasis en Gijón (Astura Princolando), nia kara samideanino Marina Piquero Muñiz, veterana membro de Astura Esperanto-Asocio kaj de HEF. Al sia fratino Araçeli kaj ceteraj familianoj, speciale al sia nevo, nia samideano Enrique Piquero, Astura Esperanto-Asocio volas esprimi la plej sinceran kondolencan kaj deziras, ke Marina atingu eternan ripozon.

Santiago Mulas, nome de
Astura Esperanto-Asocio



